

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

majo - junio 2006 • numero 81 | volumo 14 - numero 3



Novaj kotizoj
2006 por
AEA...p.2

Oficiala kurso pri
instruado de
Esperanto, ĉe
University of New
South Wales...p.4

Koaloj sur Insulo
Kanguruo...p.8

Literaturo en
Esperanto senpage
havebla per
Interreto...p.11

Vinilkosmo
anoncas siajn
novajn
diskojn...p.28

Nova profesia kurso por instruistoj de Esperanto

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIO

Numero 81 • Vol 14.3 • Majo–Junio
2006

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mel-lel, kaj la tiparoj estas Futura, Onyx, kaj New Century Schoolbook.

ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Abono kostas Aŭ\$40. Pagu al Libro-servo de AEA, 143 Lawson St., Red-fern NSW 2016 • Aŭstralio.

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco kostas \$A3.00 + poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete el-ŝuteblas ĉe:

[http://www.esperanto.org.au/](http://www.esperanto.org.au)

Esperanto sub la Suda Kruco estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur la lasta paĝo de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

esk@esperanto.org.au

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas nur la aŭtoroj.

© 2006, AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* pre-paris Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Nova abon-/membrec-prezo.....	3
Oficiala kurso pri instruado de Esperanto.....	4
Nova verkprogramo esperanta: <i>esperantoedit</i>	5
Interrete.....	6
Nia konkurso.....	6
Recenzas via redaktoro:	
<i>Klaŭstralia</i>	6
<i>Etimologia vortaro de la propraj nomoj</i>	7
Via redaktoro serĉas.....	7
Urĝa informpeto.....	7
Sukcesis en la ekzamenoj.....	7
“Ĉasi” la koalojn sur Insulo Kangaruo (Franciska Toubale)....	8
Laŭ mia vidpunkto: la homara suferado (Marcel Leereveld).....	9
Literaturo en Esperanto sur la Reto (Donald Broadribb).....	10
Membraro de Aŭstralio Esperanto-Asocio.....	12
For the Beginner.....	13
IFEF deziras tutmondiĝi.....	16
Kelkaj fotoj el la Somerlernejo.....	17
Kianniny—Kia Loko (Terry Manley).....	21
“Rep Van Ŭinklo”.....	22
Patricia Palmer (Intervjuita de Katja Steele).....	24
“Vespero pri Esperanto antaŭ la komenco de nova Esperanto-kurso” (anonima).....	25
Sydney Theatre Company ludas en Esperanto.....	26
Rimi aŭ ne rimi (Jack Drake/Gaye Phillips).....	27
Informo de Vinilkosmo.....	28

Esperanto sub la Suda Kruco
estas legebla per Interreto ĉe
<http://esperanto.org.au>

Nova Abon-/Membreco-Prezo

Pro la konfuzoj kaŭzitaj de la granda malfruo de raportoj pri la Somerkursaro 2006 en Melburno, kaj la jarkunveno samloka de Aŭstralia Esperanto-Asocio, ŝajne la plej granda parto de nia legantaro tute ne scias ke la kotizoj por AEA/Abonprezo de *Esperanto sub la Suda Kruco* **altiĝis** por 2006.

Ordinara membreco en AEA nun kostas \$40. Ordinara membreco inkluzivas aŭtomatan ricevadon de *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Simpla abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* sen membreco ankaŭ kostas \$40.

Speciale malalta kotizo por pensiuloj kaj studentoj nun kostas \$25.

Asocia membreco en AEA kostas \$10. Asocia membro estas familiano loĝanta samloke kun ordinara membro, sed ne ricevas la revuon *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Klubo povas esti membo de AEA, pagas ensume \$40, kaj ricevas unu abonon al *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Dumviva aŭ honora membro de AEA ricevas senpage abonon al *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Membroj de la Novzelanda Esperanto-Asocio havas proprajn kotizojn en novzelandaj dolaroj. Detaloj troviĝas sur paĝo 31.

Personoj en aliaj landoj, kiuj volas aboni *Esperanton sub la Suda Kruco*, pagas €24. Detaloj troviĝas sur paĝo 31.

Oficiala kurso pri Instruado de Esperanto Igor de Oliveira Couto

Kun granda ĝojo, mi volas informi vin, ke la publika universitato University of New South Wales (esp: Universitato de Nova Sud-Kimrujo), en Sidnejo, Aŭstralio, baldaŭ ofertas oficialan kurson pri Instruado de Esperanto.

University of New South Wales estas moderna kaj prestiĝa publika universitato, kaj ĝia Instituto de Lingvoj respondecas pri la instruado de estontaj instruistoj de fremdaj lingvoj. La Instituto de Lingvoj jam ofertis diversajn oficialajn kursojn pri instruado de diversaj lingvoj — angla, japana, indonezia, franca, germana, ktp. La kurso por instruado de Esperanto estas nova aldono al la listo.

Trapasinte la kurson, la studento ricevos oficialan profesionan kvalifikon, aprobitan kaj agnoskitan de la loka aŭstralia registaro, kiu ebligas lin/ŝin instrui tiun lingvon profesie — kaj eĉ ricevi registaran financan subtenon por instruado, se disponebla, ekzemple por instrui ĉe etnaj aŭ komunumaj kolegioj, aŭ en Universitato de la Tria Aĝo.

La kurso daŭras 6 monatojn, kaj kvankam nur part-tempa (lecionoj okazas nur dum 2 vesperoj ĉiusemajne), ĝi estas profunda, kaj inkluzivas:

- lingva teorio: kio estas lingvo, lingvaj trajtoj kaj strukturo, fonetiko, ktp.
- historio kaj specifaj problemoj de lingva instruado
- teknikoj kaj metodologioj de lingva instruado, ekde la 19a jar-

cento ĝis nuntempe

- analizo de la diversaj necesoj kaj problemoj de lingvaj studentoj kaj stud-grupoj
- identigado kaj elekto de taŭgaj instru-metodoj, tekniko kaj materialo
- preparo de lecionoj
- preparo de plena kurso
- specifaj trajtoj kaj problemoj pri la instruado de Esperanto
- kaj multe pli!

La kurso havas teorian parton — pli-malpli 100 horojn da lecionoj — kaj ankaŭ praktikan parton: la studento instruos Esperanton al lernanta grupo dum 6 horoj, kaj je la fino de la kurso, devos verki ne nur lecionan planon, sed planan koheran kaj profesionan kurson de Esperanto.

La plejparton de la lecionoj kune partoprenas la studentoj de ĉiuj fremdaj lingvoj, kaj tial, tiuj lecionoj estas instruotaj per la angla lingvo. La lecionoj specifaj pri Esperanto estos instruitaj aparte al la esperantistaj studentoj, de P-ro Daniel Kane.

La kosto de la kurso estos inter Aŭ \$3,500 kaj \$4,000. La unua klaso espereble komenciĝos je la fino de Aprilo — kaj finiĝos en Septembro. Se vi loĝas malproksime al Sidnejo, kaj la kurso interesas vin, sciu ke nia esperantistaro de Sidnejo feliĉe pretas aŭ gastigi vin, aŭ helpi vin trovi taŭgan loĝejon.

Krome, la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo nun ofertas stipendion por tiu kurso: se vi pretas labori parttempe kiel Instruisto de Es-

peranto por la Federacio, dum almenaŭ 2 jaroj post la kurso, la Federacio pagos la kurskotizon por vi!

La posteno de Instruisto de Esperanto estos por instrui nur kelkajn malmultajn horojn ĉiusemajne — precipe dum la vespero, kaj dum la semajnfinoj — ĉe la renovigita kaj modernigita Esperanto-Domo de Sidnejo, kaj inkluzivas allogan salajron, kaj la oportunon profunde kontribui

al la Sidneja movado.

Ĝeneralaj informoj pri la kursoj por instruado de fremdaj lingvoj ĉe la University of New South Wales troveblas — en la angla lingvo — ĉe:

http://www.lang.unsw.edu.au/teacher_education/index.htm

Sed senhezite sendu iun ajn demandon pri la kurso, aŭ pri la disponebla stipendio, rekte al mi! □



La 22a Somerkursaro kaj Kongreso de A.E.A. okazos inter la 7a kaj 19a de januaro en Hobarto, Tasmanio.



Nova verkprogramo esperanta esperantoedit

- programo ne necesigas instaladon.
- ĝi estas uzebla per Linukso kaj Vindozo.
- ĝi enhavas kompleksan adapteblan maŝinan tradukadon por pola lingvo.
- ĝi povas kunlabori kun profesiaj traduksistemoj per XLIFF-formato.
- ĝi povas traduki multajn esperantajn skribmanierojn (ĝ gx gh ^g g^html).
- ĝi ebligas facile skribi ĉapelitajn literojn per “x”-anstataŭigo.
- ĝi povas traduki multajn dosierojn aŭtomate.
- ĝi estas plena utf-8 redaktilo kaj estas uzebla por redakti multlingvajn tekstojn.
- ĝi ebligas redakti multajn tekstojn samtempe.
- ĝi enhavas “malfaru”- kaj “refaru”.
- ĝi ebligas kontroladon de ortografio..
- ĝi enhavas gramatik-korektilon
- ĝi enhavas sintaksan analizon
- ĝi enhavas multlingvan vortaron kun redakta modo

Dosiero por la programo estas elŝutebla senpage ĉe:

<http://www.xdobry.de/esperantoedit/>

• interrete


°°Plene ilustritan katalogon de (pri)-esperantaj **poŝmarkoj** vi povas trovi ĉe:

<<http://dauphin.guy.free.fr/>>

°°Ĉu vi deziras serĉi Esperanto-

grupon, kaj trovi ĝian retpaĝon? Iru al:

<<http://www.esperantoland.org/grupoj/>>



Nia konkurso



La nekonata gajninto



Por nia konkurso aperinta en la januara numero, precize **neniu** sendis kontribuon. Do gajnis premion la nekonata infano. □

recenzas via redaktoro

István Bejczy: *Klaŭstralia*. Rotterdam: Eldonejo Bero, 2005. Tr. el la nederlanda de István Ertl. 2a eldono. Rotterdam: Eldonejo Bero, 2005. 52 paĝoj, vinktitaj.

Takso: 🍷🍷🍷

Filozofiema verko kiu en sia unua parto malfavore kritikas la “merkatan” ekonomion/socion de la aktuala mondo; en sia dua parto, ĝi priskribas fikcian insulon en kiu ideala

socio funkcias. La ideala socio, laŭ Bejczy, grandparte estas mikso de hereda monarkio (ĉiam reĝino), kun ministroj deĵorantaj nur ĝis, kaj se, per referendumo ili estas eksigitaj. Privataj firmaoj pli-malpli ne ekzistas, do ankaŭ ne reklamado. La registaro estras la solajn ĵurnalon, televid- kaj radio-kanalojn. Eduko estas nedeviga; intelektuloj rajtas ne labori, kaj ricevas minimuman salajron pagatan de la ŝtato.

Kiel kutime en tiaj verkoj, estas antaŭsupozate ke la soci-estroj kaj -anoj ne eraremas. Al mi, nekonvinke. □

André Cherpillod: *Etimologia vortaro de la propraj nomoj*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio 2005. 227 paĝoj. Broŝurita.



Takso: 🍷🍷🍷🍷

Ĉi tiu libro estas kompletigo de la pli frua verko de André Cherpillod: *Konciza etimologia vortaro de Esperanto*.

Vere bone kompilita, zorge korektita, kaj bone presita libro, kian ni atendas de André Cherpillod.

Enestas 4313 propraj nomoj, personaj, geografiaj, kaj eĉ famaj fami-

liaj nomoj kiaj Rentgeno, Koreo, kaj Cherpillod mem! *Margareto* estas el la greka, en kiu ĝi signifas “perlo”; *Konrado* el la praĝermana signifanta “aŭdaca konsilo”, *Luizo* tordiĝe originis en du ĝermanaj vortoj signifantaj “glora batalo” ...

Nu, oni povas distri sin tuttage serĉante la prasignifon de nomoj. Ĉar preskaŭ ĉiuj el la nomoj ekzistas en aro da lingvoj, kun diversaj literumoj, Cherpillod zorge donas ankaŭ la diverslingvajn en la originaj skrib-sistemoj, kun laŭeble proksimuma transskribo de la prononco. Kaj, kompreneble, la originon de la nomo kaj ĝian signifon (se konstateblajn).

Do se vi deziras trovi la originon de via propra nomo, jen via konsult-libro! □

Via redaktoro serĉas

Mankas en la arkivo de via redaktoro numeroj 263 (septembro-oktobro 1990); 264 (novembro-decembro 1990); 265 (januaro-februaro 1991); kaj 267 (majo-junio 1991) de *The Australian Esperantist*. Se iu leganto posedas ekzempleron de unu aŭ pli el tiuj numeroj, ĉu tiu leganto bonvolos pruntesendi ilin al via redaktoro, por ke li povu skani ilin kaj tiel kompletigi la kolekton en la Reto kiel ankaŭ en la arkivo? La originalaj ekzempleroj, kompreneble, estos resenditaj al la pruntedonintoj.

Kaj urĝa informopeto

Ni serĉas informon pri la Fonduso Muller/Muller-Sorau. Ŝajnas ke informo pri ĝi estas en *The Australian Esperantist*, majo-junio 1991 — kiu mankas en nia arkivo! Se vi havas informojn pri tiu fonduso, ĉu vi bonvolos sendi detalojn al nia sekretario Miranda Lutz ĉe <sekretario@esperanto.org.au>, kun kopio ankaŭ por mi ĉe <esk@esperanto.org.au>? Ni antaŭdankas.

Sukcesis en la ekzamenoj

Baza ekzameno: *S-ino Mo Pettitt* (W.A.)

“Ĉasi” la koalojn sur Insulo Kanguruo de Franciska Toubale

Mi unuan fojon vizitis Kanguruo-Insulon en 1997 okaze de la Universala Kongreso en Adelajdo kaj kun ĝojo reiris al tiu insulo ĉijare por viziti nian medigardiston, Helen Palmer.

Kompreneble mi provis ekscii pli da detaloj pri la franca komandanto Baudin, kies misio konsistis el esplorado de la suda marbordo de Aŭstralio en 1801-1802-1803 por Napoleono, dum Flinders same faris por la brita krono. Estas plezure noti ke dum Francujo kaj Anglujo militis, la du esploristoj pace interŝanĝis informojn.

Antaŭ mia foriro Henry Broadbent admonis min enpenŝiĝi antaŭ la moruso, plantita de la unuaj pioniroj, kiuj surteriĝis sur la insulon en 1838. Tio fariĝis tre facila ĉar Helen loĝas ĝuste tie, sur la supro de monteto apud Reeves Point. Mi eĉ trovis la tombon de unu el liaj praavoj en la malnova tombejo kaj parencon lian, kiu daŭre loĝas sur la insulo, produktante mielon.

Sed kion faras Helen sur la insulo? Ŝi kaptas koalojn. Kial? Jen la tuta afero: Timante ke la koaloj malaperos en Aŭstralio, niaj prauloj en la 1920aj jaroj transportis dek ok koalojn sur Kanguruo-Insulon, ĉar tie ne troviĝas vulpoj aŭ dingooj. Ili tre bone prosperis. La scienculoj taksas ke ilia nombro nun atingas 27 000. La insulo ne povas vivteni tiom da ili. Tro da arboj estas de ili detruitaj. La registaro konsentas elspezi 4 milionojn da dolaroj por ke 2000 koaloj estu steriligitaj ĉiujare dum kvar

jaroj. Do kune kun la aliaj medigardistoj Helen kaptas la koalojn, kiujn bestkuracistoj steriligas, kaj remetas ilin en iliajn vivlokojn aŭ foje ili estas transportitaj aviadile al aliaj lokoj kia la monto Gambier.



Helen surgrimpas eŭkaliptarbron

La laboro ne estas facila. Necesas korpa forto, lerteco kaj bona kono de la medio por distingi inter la eŭkaliptarboj tiujn, kiuj estos la plej ŝatataj de la koaloj. La unua etapo estas la serĉado en sovaĝejo, kie multaj plantoj havas dornojn pro la sekeco. Rapide oni kutimas iri kun la nazo direktita al la ĉielo por ekvidi la bestojn je la pinto de la arboj. Tiam necesas, ofte per binoklo, observi ĉu ĝi estas ŝi aŭ li, ĉar foje nur la virkoalojn oni kaptas, foje inverse, laŭ la ordono de la ĉefo. Iu restas ĉe la piedo de la arbo kaj ĉirkaŭigas la trunkon per brilkolora rubando sufiĉe alte por ke ĝi videblu de kiel eble plej for, dum la aliaj iras por preni la necesan materialon — estas tro peze por porti ĝin konstante — longajn stangojn kun pikoj, ŝnurojn, sakojn

ktp. La bonŝanco estas ke la koaloj dormas tiom multe ke ili ne forkuras. Ĉiuj ĉeestantoj surmetas kaskon kaj volontulo ekgrimpas la arbon, uzante ŝnurojn. Atinginte la supron, li/ŝi metas ŝnuron kun nodo sur la pikon de la stango kaj ĉirkaŭigas la kolon de la koalo per ĝi. Poste, tenante la ŝnuron, kiu nun malhelpas la koalon grimpi pli alten, li/ŝi alrokcas flavan flagon sur la pikon de la stango kaj metas ĝin antaŭ la okulojn de la besto, kiu malsupren grimpas por ĝin eviti. Kiam ĝi atingas la grundon, iu enigis ĝin en sakon, fiksas etiketon kun nombro je ĝia orelo.

Je la fino de la “ĉasado”, antaŭ ol la teamo enveturiĝas, la koaloj estas eligitaj el la sako por eniri kaĝon, pli komfortan lokon, aparte kiam la vetero estas varmega.

Ni esperu ke tiu peniga, kosta la-

boro plibonigos la situacion sur Kangaroo-Insulo. Pli ol unu loĝanto opinias ke estus samefike, tamen pli rapide kaj malkare, se la koaloj estus simple “ekstermitaj”. Sed kiel reagus la koalantoj de la mondo? Kiel eviti ke sentimentaleco regos ilian juĝon?



La koaloj atendas la operacion



• laŭ mia vidpunkto

La homara suferado de Marcel Leereveld

La du plej grandaj skurĝoj batantaj la homaron estas la daŭra kaj danĝera atakado de la ĉirkaŭa kaj ena naturo, kaj la malamika atakado de unuj homoj al aliaj.

La inteligento kaj la scienco helpas la homojn defendi sin kontraŭ la atakoj de la naturo, kaj helpas ilin konduti tiel, ke ili povu pli-malpli harmonie vivadi en tiu naturo. Pro malsaĝaj interrilatoj inter la homoj, tiu helpo eviti la danĝerajn atakojn de la naturo direktiĝas al unuj homoj multe pli ol al aliaj homoj. Krome la inteligento kaj la scienco ne ĉiam

estas sukcesaj.

La same ĉiaspecaj atakoj de unuj homoj al aliaj homoj same kaŭzas grandegan suferadon. Por kontraŭbatali ankaŭ la interhoman malpacadon, la inteligento kaj la scienco devus sukcese helpi. Ni povas tamen konstati ke, por evitigi interhoman suferigadon, la inteligento ne multe helpas la homojn, kaj eĉ malpli la scienco.

Por esti kaj resti sanaj, mense kaj korpe, la plej grandaj taskoj de la tuta homaro kaj de ĉiu homo individue, estas do unuflanke defendi sin

kontraŭ atakoj de la naturo, kaj aliflanke malaperigi la suferigadon de unuj al aliaj homoj. Eĉ se interhoma malpacado ne ekzistus, la suferado pro nefacile eviteblaj atakoj de la naturo (malsanoj, akcidentoj, ktp.) jam estus tiom grandega, ke estus stulte pliigi tiun suferadon per interhoma suferigado,

Ni multe faras por mildigi la atakojn de la naturo, kvankam ne sufiĉe ĉiuinkluzive (ĝuste pro nia neinteligenta kaj nescienca traktado de interhomaj rilatoj). Nia plej urĝa tasko koncernas do la duan danĝeron: la interhoman atakadon. Tio koncernas la sociajn interrilatojn inter la homoj, kreantajn aŭ interbataladon aŭ interhelpadon.

Ĉar evidente la sociaj rilatoj preskaŭ ĉie en la mondo estas tiaspecaj, ke ili kaŭzas aŭ daŭrigas interho-

man atakadon anstataŭ helpadon, nia precipa tasko estas la ŝanĝo de tiuj sociaj interrilatoj, ĉar nenio alia povos senigi nin de la grandega suferado. Tiu tasko estas tiom urĝa kaj necesa, ke ĉiuj aliaj problemoj estas nur flankaj. Ĉi tiuj duagrada problemoj inkluzivas eĉ la limigitajn lokajn interhelpojn inter la homoj, kiujn faras movado kia Amnestio Internacia, religiulo kia Patrino Terezo, kaj sennombraj aliaj grupoj kaj personoj uzantaj provizorajn rimedojn por mildigi iom la suferadon sed ne ŝanĝantaj la sociajn nunajn, la kaŭzon de la grandega homsuferado. □

[En la ĉisupra artikolo la aŭtoro plurfoje uzis esprimojn “(ate) de” kaj “ante” (=al), kiujn mi regule ŝanĝis al simplaj “de” kaj “al”. –db]

LITERATURO EN ESPERANTO SUR LA RETO

kompilita de Donald Broadrib

Abundas libroj, poemoj, teatraĵoj, biografioj, kaj ĉiaj aliaj literaturaĵoj senpage elŝuteblaj per la Reto.

- *La paĝo per kiu komenci serĉi tiajn literaturaĵojn estas:*

<<http://esperanto.luin.nu/eLibrejo>>

kiu ekde la fino de marto denove funkcias bone kaj estas precipe valora por personoj serĉantaj e-librojn.

Oni povas elekti inter multe pli ol 200 libroj, rakontoj, dramoj, poeziverkoj, kc.

- Tamen, tio estas nur komenco. Multcent aliaj verkoj ankaŭ legeblas kaj elŝuteblas ankaŭ aliloke

en la Reto:

- *Unue, por ĝenerala trarigardo de nia originala esperantolingva literaturo, tre utila kaj facile konsultebla sito estas ĉe* <<http://esperanto.net/literaturo/index.html>>.
- *Oni trovas multajn tekstojn de romanoj kaj aliaj tekstoj tradukitaj en Esperanton el la rusa lingvo, inter ili pluraj tre gravaj verkoj, ĉe:*

<<http://miresperanto.narod.ru/biblioteko.htm>>

Ili estas počapitre legeblaj kaj elŝuteblaj. Ankaŭ estas diversaj verkoj nerusaj en Esperanto.

- *Vi povas ankaŭ trovi tre grandan nombron* da esperantolingvaj libroj elŝuteblaj, ĉu en formo PDF, ĉu por surekrana lego kaj elŝuto, ĉe: <http://dmoz.org/World/Esperanto/Kulturo/Literaturo/>
- *Troviĝas en esperanta traduko multaj ĉinaj verkoj*, ĉe: <http://esperanto.org/literaturo/huguozhu/>
- Ankaŭ ĉe la adreso <http://el-erno.net/elibro/elibroj.htm> elŝuteblas granda nombro da elĉinaj verkoj. Kaj...de kelkaj mondliteraturaj neatenditaj, ekz. *La origino de specioj* de Darwin, en Esperanto.

- Ĉe <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/> eblas elŝuti grandan nombron da rakontoj, poemoj, kc., el la tuta mondo.
 - Ĉe <http://gxangalo.com/modules/mylinks/viewcat.php?cid=16> eblas elekti laŭ listoj de verkoj tradukitaj el la angla, franca, hungara, rusa, lingvoj en Esperanton, inkl. multajn novelojn kaj kelkajn romanojn.
 - Eksterordinare tre granda nombro da artikoloj diverstemaj elŝuteblas ĉe: <http://esperanto.ulver.com/esplink.html#stih16> (Kelkaj artikoloj estas nelongaj; aliaj estas librolongaj.)
- Ĉe ĉi sito vi trovos verkojn pri ĉiaj temoj, pri kiuj vi tute ne sciis ke ekzistas literaturo en Esperanto!

Krome, multaj libroj, originalaj kaj tradukitaj, troveblas ĉe retadreso kiujn oni nur hazarde ektrovas. El ili, mi kompilis tre malkompletan liston:

Speciale atentindaj:

Ivan Efremov: *La Andromeda Galaksio*. Ĉe:

<http://www.esperanto.mv.ru/Efremov/andromedo.html> (Sciencfikcia romano)

Ivan Efremov: *Horo de Bovo*. Ĉe <http://www.esperanto.mv.ru/Efremov/horo.html> Sciencfikcia romano.

Harry Harrison: *Naskiĝo de la rustimuna ŝtalrato*, ĉe:

<http://www.esperanto.org/Ondo/Rato01.htm> Sciencfikcia romano.

Edgar Rice Burroughs: *Tarzan de la simioj*. Ĉe:

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Tarzan/>

Libroj por infanoj, ĉe <http://www.icxlm.org/>

ABC en Esperanto. 30 paĝoj. Klarigoj en la angla.

Vortareto kun prononcado kaj angla traduko. Estas unu paĝo por ĉiu litero de la alfabeto, kun bildo de io kio komenciĝas per tiu litero. Oni povas kolorigi la bildojn.

Flugu kun Petro (A) Demandoj kaj respondoj. Klarigoj en la angla.

La Bela Planedo. 20 paĝoj. Demandoj kaj respondoj. Nur Esperanto.

- Planedoj, homoj, bestoj, plantoj, landoj kaj kontinentoj.
Kantu Esperante. 24 paĝoj. 12 kantoj kun muziko. Nur Esperanto.
12 lecionoj, ekzercaroj rilataj al ĉiu kanto.
La junaj detektivoj. 48000 literoj kaj spacoj. Rakonto pri Kontra-
bandistoj. Facila legolibro, sen bildoj.
Dek demandoj. 45 paĝoj. Lernolibro por infanoj 7 ĝis 14-jaraj. Unu-
paĝa klarigo en la angla. Demandoj kaj respondoj. 6 kantetoj kun
muziko.
Frazaro. Listo de proksimume 100 ordinaraj frazoj en la angla,
esperanta, kaj hispanaj lingvoj.

Se vi serĉas specialistajn vortarojn, pluraj haveblas perrete. Inter ili:

- Astronomia terminaro, tre granda, troveblas ĉe:*
<<http://at.komputilo.org/>>
Enciklopedio pri Filozofio, ĉe <<http://www.cfh.ufsc.br/~simpozio/Esperanto/ATOMA.htm>>. Giganta projekto.
Fotografia vortaro ĉe <<http://www.freeweb.hu/eventoj/steb/vortaroj/fotografio/fotografio.htm>>
Go-ludo estas tre populara azia ludo. Detalan vortaron ĉe <http://homepage1.nifty.com/mori_kin/inpaku/enhavo.htm> (kun ilustraĵoj).
Hejma vortaro ĉe <<http://www.helsinki.fi/~jslindst/hejmvort.html>>
Interreta vortareto ĉe <<http://www.esperanto.be/vortaroj.html>>
Komputika leksikono de Sergio Pokrovskij, ĉe <<http://www.iis.nsk.su/persons/pok/Eo/KompLeks/html/DEFAULT.html>>. Giganta verko.
Lexicon silvestre ĉe <http://w3.forst.uni-muenchen.de/~quednau/lexsilv/lexsilv_eo.html>
Matematika vortaro Esperanta-ĉeĥa-germana ĉe
<<http://www.muweb.cz/Kultura/malovec/MATEM.HTM>>
Meteorologia vortaro ĉe <<http://esperanto.port5.com/meteo/meteo.htm>>
Multlingva genealogia vortaro ĉe <http://worsten.org/vortaroj/genealogia_vortaro.htm>
Multlingva vortaro pri profesioj, funkcioj kaj rangoj ĉe <<http://worsten.org/vortaroj/profesioj.htm>>
Nomoj de etnoj: <<http://www.geocities.com/ikeldv/etnoglosaro.html>>



Membraro de Aŭstralia Esperanto-Asocio kompilis Donald Broadribb

En la juli-aŭgusta numero de *The Australian Esperantist* 1990 ni aperigis tabelon de la la membraro de AEA, aranĝitan laŭ ŝtatoj. La kalkulo estis laŭ la stato je la 1a de junio 1990.

Nun je la 7a de aprilo 2006 mi faris similan tabelon pri la membraro de AEA. Ne kalkulitaj estas membroj de NZEA, ĉar por 1990 tiu kalkulo mankis. Rimarku rimarkindan malgrandiĝon de la membraro en Okcidenta Aŭstralio,

kaj egan pligrandiĝon de la nombro en Sudaŭstralio.

Notoj: f=familia membro.

Dum la 15-jara periodo la asocio perdis \neq 8 membrojn.

	1990	2006
NT	02	02
NSW+ACT	53+8f	53+6f
VIC	46+7f	38+8f
QLD	34+6f	33+3f
SA	08+2f	22+3f
WA	25+5f	13+1f
TAS	07+2f	6
<i>Sumo</i>	<i>175+30f</i>	<i>167+21f</i>
Alilandaj abonoj al <i>ESK</i>	03	26

☐ ☐

For the Beginner

by Donald Broadribb

A particularly difficult problem for anyone who sets out to learn another language, knowing only English, is to realize that much of what we take for granted in English speech is merely the result of centuries of popular usage, and a rather irregular intermixture of influences from other languages, as first one and then another foreign power conquered England and imposed its way of speaking on the British.

The Roman invasion some two thousand years ago brought vast numbers of mostly uneducated Latin speakers who settled among the pop-

ulation and radically changed the then British language. Invasions by Scandinavians and French brought still more language disruption, until the language of Britain became a weird mixture of grammatical customs and often distorted words. The illiteracy of the general public during most centuries did little to ease the situation.

As a result, although English gained what is perhaps the largest vocabulary of any language in the world, by taking over (often in a variety of forms) words from other languages, its usage became quite

chaotic, chock full of expressions and word usages difficult to unravel in the present day.

For example, I once knew a Finnish teacher who insisted that the English word “lovely” means “loving”, since it was made from the word “love”. How, in fact is it, that “love” and “lovely” no longer have any connection with each other in English?

A friend of mine once asked me to explain what is the reason we use the word “Do” in so many strange ways, such as “Do you see?”; “I *don't* know”; “He *did* his homework”; “If I *do* go, I will certainly let you know”; “How *do* you do?” “Much *Ado* About Nothing”; “They won't *do* anything until you tell them to”; etc.

Many of our everyday expressions are due to local customs. “Listening to operas is simply *not my cup of tea*” obviously comes from a people for whom tea drinking is particularly important — and incomprehensible to anyone who comes from a culture in which tea drinking is not customary.

Over the past 120 years Esperanto has also developed a particular way of expressing ideas which is all its own. One major task of the student is to forget much of what is taken for granted as part of speaking English, and to learn what has become standard Esperanto.

In this article I cannot cover everything, but I can bring out some of the more common problems English speakers face when learning Esperanto.

① *ne devas*. In English we are used to placing the words “no” and “not” in specific positions. We run

into trouble when the English word pattern runs contrary to the customary Esperanto pattern.

“You must not forget to phone me” = *Vi ne devas forgesi telefoni min*. “In any event, we must not give your plans away” = *Ĉiukaze, ni ne devas malkaŝi niajn planojn*.

In Esperanto, *ne devas* means “must not”. If we want to say “do not have to” the usual way is to say:

Ne nepras sendi al ŝi donacon, sed estus ĝentile = “you *don't* have to send her a present, but it would be a polite thing to do.

“You must stop behind a stopped tram but you do not have to stop behind a stopped bus, unless it's a school bus” = *Necesas halti malantaŭ haltinta tramo, sed ne necesas halti malantaŭ haltinta buso, krom se temas pri porinfana buso*.

So when reading or listening to Esperanto, it's important to remember that “ne devas” is a prohibition. *Oni ne devas fumi ĉi tie!* = “No smoking here!”

② In English we are accustomed to distinguish between “expect” and “wait”. In Esperanto it is the context that distinguishes the exact meaning:

“I'll **wait** until I see you” = *mi atendos ĝis vidi vin*. “I did not **expect** you to be so late!” = *Mi ne atendis ke vi tiom malfruos!*”

③ *Expressing time:*

This seems to be the most difficult thing of all for students learning Esperanto who are familiar only with English.

In English we have several ways of expressing time:

“When *did* that happen?” = *Kiam tio okazis?*

“I have not seen that movie yet” = *Mi ankoraŭ ne vidis tiun filmon*”.

“I have just written him a letter” = *mi ĵus skribis leteron al li*.

④ It often takes new students a long time to become accustomed to what to English speakers looks like a misuse of the word *al*:

Li frapis al mi la manon = “he hit my hand”. There is nothing wrong with writing *li frapis mian manon*. but you will run across this alternative way quite often — it has been embedded in Esperanto for a good hundred years now.

You will often also find such phrases as *Ili ŝtelis al ŝi la bileton* = “They stole her ticket”.

This can sometimes confuse an English speaker: *Li forbatis al mi la pistolon* = “He knocked the pistol from my hand.”

This sort of usage goes back to the earliest years of Esperanto, and probably owes its origins to a grammatical custom in the Slavic languages. You will get used to it in time, but you might do well not to imitate it yourself.

⑤ Certain idioms have evolved in Esperanto over the years, and it is just as well to become familiar with them. Some of them are:

Li ne estas konata al mi = “he is not known to me”. Grammatically, this ought to be ...*konata de mi*, but nearly everyone uses the phrase *konata al*.

krokodili

No one really seems to know how the word *krokodili* came to mean “to speak an ethnic language in an Esperanto environment”, but it too is well entrenched in Esperanto usage. An-

dré Cherpillod, in his *Konciza etimologia vortaro* states that the word began in Paris in the early 1930s, where *krokodilo* was used as a slang term to mean a “savage who does not even speak Esperanto”. Ebbe Vilborg in his *Etimologia vortaro de Esperanto* is somewhat doubtful of that. I have read a number of other explanations of the origins of the term. In any event, it is a very picturesque term which I find well worth using.

ĝis

The word *ĝis* = until, but it is regularly used in a manner unfamiliar to English speakers: *Sendu vian kotizon ĝis la fino de majo* = “Send your fee by the end of May”, or “before the end of May”. This use of *ĝis* is logical, but may trip you up, since an English speaker would have expected *antaŭ* instead of *ĝis*.

Ĝis!

Dictionaries will usually tell you that the Esperanto for “Goodbye!” is *adiaŭ*, but almost universally the term used for that is *Ĝis!* or *Ĝis la!* which is short for *Ĝis revido!* or *Ĝis la revido!* These play much the same role as “See you!” in colloquial English, or simply “Bye!” or “Bye bye!”; except that in Esperanto *Ĝis* and *Ĝis la!* are not merely colloquial but used but in all but the most formal occasions.

esperantoj

Many Esperanto writers, especially poets, like to play on the double meaning of the word “esperanto”, which means both the language Esperanto and a simple name “hoper”. □

IFEF deziras tutmondiĝi de Jindřich Tomášek, Ĉefkomitatano de IFEF

I.F.E.F. estas la akronimo de la monda organizaĵo de la fervojistaj esperantistoj, nome “Internacia Fervojista Esperanto-Federacio”. Ĝi estas faka, kultura organizo, neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko kaj sociaj problemoj kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj.

Fondita dum la 5-a UK en 1909 en Barcelono, kun interrompo de la evoluo kaj agado dum ambaŭ mondmilitoj ĝi do kunligas la fervojistajn (kaj iujn alitrafikistajn) esperantistojn jam preskaŭ centjaron.

La nuna IFEF refondiĝis post la dua mondmilito en la jaro 1948 en Amsterdam kun komence 250 registritaj membroj kaj en la sama jaro oni sukcesis denove aperigi regule ĝian revuon. Ekde la jaro 1949 IFEF aranĝas ĉiujare sian kongreson, okazanta laŭ la invito de iu landa asocio aprobite de la Komitato. La ĉijara 58-a IFEF kongreso okazos la 6-an ĝis 13-an de majo en Ŝanhajo, Ĉinio; la venonta 59-a IFK okazos 12-18/05/2007 en Parizo, Francio.

Konstanta evoluo post la dua mondmilito karakterizas la IFEF-movadon, kaj ĝi fariĝis la plej forta kaj la plej aktiva faka organizaĵo de UEA.

IFEF havas gravan Fakan Komision, kiu konsistas el Terminara kaj Fake Aplikaj Sekcioj.

La Terminara Sekcio funkcias ekde 1950, kaj ĝi konsistas el fakuloj de la landaj asocioj, pluraj el kiuj eldonis fervojfakan terminaron. La plej granda laboro kaj rezulto de tiu Sek-

cio estis la traduko de la seslingva surpajera faka terminaro de UIC (Internacia Fervojunio), enhavanta pli ol 15 000 pure fervojfakajn terminojn. Nun la lasta eldono de la terminaro estas akirebla en 20 lingvoj sur CD-ROM. UIC prilaboras difin-vortaron kaj, paralele de tiu, IFEF preparas Esperanto-varianton.

De tempo al tempo Terminara Sekcio eldonas periodaĵon por la kunlaborantoj sub la titolo *Terminara Kuriero (TeKu)*.

La Fake Aplika Sekcio komencis funkcii en la jaro 1959. Ĉiujare en la IFEF-Kongresoj la plej grava programero estas la ĉefa fakprelego, kiun ĝenerale la organizanta lando preparas kaj prezentas. Ekde la jaro 1981 tiu Sekcio kompletigas la programon kun la tielnomata programero “fakprelegetoj”. La nombro de diversnaciaj prelegantoj varias inter 6 kaj 12. Tiuj informas pri la plej freŝaj fakaj novaĵoj de la koncernaj landoj. Krom tiuj kongresaj programeroj daŭre aperas fakartikoloj en la revuo *Internacia Fervojisto*, kiu aperas sesfoje jare, krome ankaŭ en fervojfakaj revuoj de la landaj asocioj. Per tiuj fakartikoloj oni kontribuas al la plilarĝigo klaj interŝanĝo de la fakaj konoj.

IFEF ĉiujare aperigas fakan kajeron sub titolo “Fervojfakaj Kajeroj”, tiel eldonante la plej valorajn fakajn prelegojn.

Grava atingo estas ankaŭ, ke pluraj landaj asocioj aperigas la klarigan tekston de la fervoja horarlibro en Esperanto, aktuale en 5 eŭropaj

landoj.

Rimarkindas ankaŭ, ke la estraro jam eldonis la historion de IFEF en tri okazoj, nome volumoj pri la periodoj 1909-1968 (60-a fondaĵdatreveno), 1909-1984 (75-jara jubileo) kaj Suplemento pri la jaroj 1984-1999 (90-jara datreveno).

Membraro de IFEF konsistas el aliĝintaj membroj de laŭstatute organizitaj landaj asocioj, individuaj membroj el landoj, kie ne ekzistas landa asocio, honoraj membroj k.t.p. IFEF aktuale havas 20 landajn asociojn kun 1100 registritaj membroj kaj pli ol 4 mil asociaj membroj en la sekvaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Kroatio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Rumanio, Serbio, Montenegro, Slovakio, Slovenio. Kro-

me individuaj fervojistaj membroj aliĝis al IFEF en Britio, Finnlando, Hindio, Irano, Rusio, Svedio kaj Svislando.

Mi alvokas fervojistajn kaj eĉ alitrafikistajn esperantistojn en la laste menciitaj sed ankaŭ en ĉiuj aliaj nenomigitaj landoj aliĝi al nia movado, fariĝi individuaj membroj kaj en konvena tempo fondi landan asocion, kiu povus eĉ pli efike kunlabori, partopreni la agadon de IFEF laŭ ĝiaj Statuto kaj Laborplano. Pliajn informojn vi povas peti de la ĉefkomitatano de IFEF: Jindřich Tomášek, CZ-751 18 Říkovice n-ro 33, Ĉeĥa Respubliko. Li tre volonte kunlaboros precipe kun kontaktuloj el ĉiuj postsekvaj landoj de Sovetunio kaj el aziaj landoj (krom Ĉinio kaj Japanio, kie ekzistas jam fortaj landaj asocioj de IFEF).

Kelkaj fotoj el la Somerlernejo en januaro kaj la ĉirkaŭa regiono






Oni serĉas



Oni manĝas



Oni grupfotas



Oni dormas



Oni pejzaĝas



Oni busas



Oni bovinas



Oni kunvenas



Oni skermas (Anthony Gaskell kaj Miranda Lutz)



Oni ludas



Moderna ponto



Kaj kiam necesas



Oni sagpafas



Klaso de Penny



Oni vortumas



Oni diskutas



Oni esploras

KIANINNY – KIA LOKO!

De Terry Manley

Post la du artikoloj en la Marto-Aprila ESK pri la ejo por la somerkursaro mi deziras aldoni mian opinionon por iom ekvilibrigi la raportojn.

Mi iris al la loko atendente, ke mi gvidos kurson pri naturo, partoprenetos en iuj el aliaj okazoj kaj ferios kun mia familio. Se la loko ne estus feriejo mia edzino kaj filino ne alvenus. Mi ne atendis, ke la edzino kaj filino partoprenos multe en la programo. Sed kia loko! Bonega por mia kurso, kiu estus neebila en aliaj antaŭe elektitaj kursejoj. Kaj bonega por la familio. Oni povis resti en la loko sen bezono serĉi distraĵojn eksterajn. Kanuoj, lago, naĝejo, tenisejo, pafarkejo ktp. Kaj surprize mia edzino aliĝis al la kurso de Atilio kaj multe ĝuis tion dum la filino partoprenetis en la infana, unua kaj Atilia kursoj. Krome ili kantis, kaj dancis dum distraĵvesperoj.

Kaj la artikolon de Bob kaj la artikolon de Franciska, mi trovis iom enigmaj.

En tiu de Bob li komencis per: “Estis same kiel ĉiuj aliaj antaŭ ĝi, tre sukcesa.” kaj finiĝis per: “Do entute granda sukceso”. Sed interne ne estas multe por subteni kial la kurso estis tia granda sukceso.

Eble pravus lia skribo: “Por la infanoj la feriejo estis tre bona, sed ne estas troigo se mi singarde direktas, ke por somerkursaro ĝi ne taŭgas.” — sed en la frazo: “La plej multajn tagojn la vetero estis malbonega, unu tutan tagon ni havis eĉ ne elektron.” — laŭ mi li certe troigas. Sed eble nur temas pri opinio. Por mi la

vetero estis ĉiela la tutan tempon! Sed komprenu, en mia hejmurbeta dum Januaro kaj multe da Februaro la temperaturo senĉese atingis pli ol 40 gradojn sen pluvo! Eskapi tion estis ĉiele. En Tathra mi iris al la plaĝo plurfoje, marŝis en la arbaro multfoje kaj ne povas imagi pli taŭgajn kondiĉojn. Mi ankaŭ ĉeestis kurson sur verando kaj aranĝis parton de mia kurso sur la sama kaj ne plendus pri vento aŭ muŝoj, kiujn mi ne multe rimarkis. Eble oni devus plendi pri la sorĉe distrema pejzaĝo! Kaj ĉu elektromanko dum tuta tago? Mi eĉ ne rimarkis en la mateno (kaj dubis ĉu estis tiel). Laŭ mia memoro estis dum 2-3 horoj ptm-aj kaj kvankam la loĝestro disdonis kandelojn, oni ne bezonis ilin ĉar je mallumiĝo, eklumis la elektro.

En la komenco de la artikolo de Franciska, nepre estas eraro. Ŝi komencis per: “Mi preferas prisilenti la negativajn aspektojn” — sed devas esti: “Mi preferus...” — ĉar tiu longa unua alineo (preskaŭ kvarono de la artikolo) vere koncentriĝas je la negativaj aspektoj.

Do mi skribas laŭde, nome de la familioj. Kaj tiuj reprezentas pli ol sesonon, kiun Fran kalkulis. Estis 21 el 61 laŭ la adreslisto. Jes certe oni kalkulu la gepatrojn. Ili multe gajnis pro la loko. Plurfoje Annolies Truman kaj Barry Healy dankis pro tio, eĉ dirante, ke ne eblus tiel partopreni pri kursoj, ekzamenoj en alia loko.

Mi scias, ke kaj Bob kaj Fran, proponas, ke la loko pli taŭgas por

“Renkontiĝo de Familioj”. Kaj, jes ili pravas. Sed kiel arigi la Esperantistojn de Aŭstralio sufiĉe grandnombre por sukcesigi la okazon? Somerkursaroj kutime allogas 60-90 dum la pasintaj 15 jaroj. Fakte oni bezonas tiom por finance kaj laŭsperte sukcesigi la aferon. Sen tiom estus malfacile pagi la instruistojn, kontentigi loĝestron, aranĝi manĝaĵojn, havi diversistemajn programerojn ktp. Organizanto scias tion. Nuntempe ni restas negranda disa grupo en grandega lando kaj devas kune agi por sukceso. Kaj somerkursemluloj, kaj kongresemluloj kaj familioj, toleru kaj subtenu unu la alian. Se ni havus apartajn okazojn ni malfortiĝus.

Malgraŭ modernaj transportiloj, grandega lando ankoraŭ restas malavantaĝo. Eble la loko, Tathra, emfazis tion. Iuj nejunaj Esperantistoj en Sidnejo konfesis, ke pro veturproblemoj ili ne partoprenis. Kaj, ĉu ne, Bill kaj Betty Aulsebrook meritas oran medalon pro ties “Maratono” veturante per aŭto dum tri tagoj por atingi la lokon kaj same reveturante?

Mi tre dankas al la organizantoj (mi ne estis unu el tiuj) de la kursaro ĉe Kianinny pro ties lokelekto kaj al la esperantistoj de Aŭstralio, kiuj venis kaj subtenis tion ĝis sukceso. Mia familio multe gajnis, ne nur pro la ferio sed ĉar ili lernis multe da Esperanto.



REP VAN ŬINKLO IAM, IE, EN 2030

Drameto premiita dum la Somerkursaro

Antaŭnoto: Estas bone se la rolulo de “Junulo” lernas iom de la signolingvo por surd/mutuloj kaj uzos ĝin klare por ke la Esperantistaro povu pli klare kompreni lin.

Scenejo: Barbulo kovrita per malnova ĵurnalo kaj folioj kuŝas sur benko en parko. Eniras junulo gaje vestita kaj portanta grandan libron sur kiu estas “KID 2030” grandlitere. Studante la libron li rondiras la benkon unufoje. La barbulo komencas vekigi kaj la junulo rigardas iom ŝokite de la aspekto de li.

Barbulo: Kia dormo! Mi sentas, ke mi dormis post la kutima vekhor.

(Rigardas al horloĝo kaj skuas ĝin.)

Junulo: Dormo? Dormo? Kiu lanĝiĝo vi pikas?

Barbulo: Kion vi diris? Sonas iomete kiel Esperanto! Ne kredeble! Mi pensis, ke mi estas la lasta surtere.

Junulo: Kio? Kio? Mi rekognizas iuj ŭordoj. Vi, — kiel, — mi, — ESPE-RANTO!! Sed tio estis olda langŭiĝo. Deda langŭiĝo.

Barbulo: Mi ne komprenas vin. Kio? Rekognizas? Ŭordoj? Olda? Kian lingvon vi parolas?

Junulo: Vi ne anderstandas mi? Mi spikas Esperantido. Mi tiĉos vi. Ajo ... (fingromontras al okulo), iro (fingromontras al orelo), nozo ... (fingromontras al nazo), tufo ... (fingromontras al dento) ...

Barbulo: Sed tio estas dento kaj tio ne estas iro sed orelo. Oni iras ...

Junulo: Ha! Ne, ne, ne, ne! Dento estas tio atde akcidento. Akci-dento. Oni goas per karo (*imitas veturon en aŭtomobilo*) kaj kraŝ (*imitas frapon de aŭto*) akci-dento. Dento en la karo. (*Montras kaveton en la imaga aŭto*) Kaj oni ne iras. Oni goas. Goos, goas, gois. (*Promenetas laŭ la podio montrante la tempojn de la verboj*). De kie vi lernis ŭordoj?

Barbulo: Aĉ! Oni ne rajtas simple krei vortojn! Baza radikaro ja sufiĉas.

Junulo: Do mi tiĉos vi more: miaŭas (*imitas katon*), dogo barkas (*imitas hundon*), dako kvakas (*imitas anasdon*), berdo pekas (*imitas birdon*). Armo (*indikas brakon*), lego (*indikas kruron*) ...

Barbulo: LEGO!!! Tio estas kruro. Oni legas libron.

Junulo: Kio? Ha, ha! Oni ridas buko.

Barbulo: Sed eĉ se oni uzus tiujn vortojn, devus esti: Oni ridas bukoN.

Junulo: Ho olda, olda langŭiĝo. Dajnasora, ekstinkta! Vi ne remembras kiam estis biga konferenco kaj oni desajdis englišaj ŭordoj estas internaŝonelaj. Do Esperanto dedis kaj bornis Esperantido. Kaj la uso de tiu "N" estis veri hard...a.

Barbulo: Sed la FUNDAMENTO!!!!

Junulo: Senatente. Kaj la resalto estis guda. Ni naŭ havas fonetika alfabeto. Ĉio estass...ss en oh en ordo. Kaj mi ĝust bajis niŭa KID.

Barbulo: KID? Ĉu ne PIV. Peza Instruema Vortaro? Kio estas KID?

Junulo: Komplita Ilastrejtida Dikŝonero! Atde ŜCERCO. Ŝ..E..R..C..O. Ŝovu la Englišo en Rila Cirkonstanco Ordinara ...Anderstandeble!

Barbulo: Kio? ŜALTU. Ŝ..A..L..T..U. Ŝovu Anglan Lingvon Trans Univerŝo!

Junulo: (Ne atentante.) Hir! Hir! Niŭa KID! 2030. (*pronocas du ziro tri ziro*). Vi mastas baji ĝi. Estas ne ĉojco sed masto. La weldgovernmento insistas pri tio. Ĝi kostas onli 15.000 IuEs DOLOROJ atde worldmonisistemo.

Barbulo: Diable! Mi reendormiĝas. (Kuŝigas sin kaj rekovras sin.)

Junulo: (Ŝultrumas kaj malrapide forvagas legante la libron KID en la direkto de la rigardantaro.) Hmmm ... Buŝo. Olda, fama IuEs Prezidento. (Kapjesas) Guda!!

FINO




La Duonokulvitro

Nur 14-minuta, sed kia DVD!

La unua originala dramo en Esperanto, en scenejigita kaj filmita en Britio. La unuan fojon rigardeblan per DVD. Nepre akiru ĝin.

Patricia Palmer intervjuita de Katja Steele

Pat naskiĝis la 16an de aŭgusto 1933 en vilaĝo Oxted en la suda regiono de Anglujo. Ŝia patro, Geoffrey Edmonds, estis pastro de protestanta religio. Ŝia patrino, Freda, estis unu el la unuaj virinoj en Anglujo, kiuj ricevis universitatan diplomon (pri fiziko).



Helena Palmer

La familio, al kiu apartenis ankaŭ la frato de Pat, restis en Oxted, proksime al Londono, dum multaj jaroj. Tie Pat vizitadis la elementan lernejon kaj en Sussex la meznan. Dum la jaroj 1952-55 ŝi studis la francan kaj la hispanan lingvojn en la universitato Sankta Andrews en Skotlando. Samloke studis sciencon Jack Palmer, al kiu Pat poste edziniĝis. Post la fino de la studoj sekvis du jaroj da laboro kiel lingvoinstruistino en lernejo por knabinoj kaj poste patriniĝo.

Jaro 1964: granda ŝanĝo – kun ekscito kaj samtempe malĝojo – ĉar la familio elmigris al Aŭstralio. La kialo estis laborposteno por la edzo de Pat. La familio ekloĝis en Kanbero (Canberra). Tie Pat vizitadis universitatan kurson pri biblioteka

laboro kaj edukado (1970-73). Sekve ŝi iĝis bibliotekistino en diversaj elementaj lernejoj en Kanbero dum 17 jaroj.

1992: translokiĝo

al Adelajdo kaj kurso pri konsilado


La unua informo pri Esperanto atingis Pat-on en 1997, kiam la UK okazis en Adelajdo. Unu aŭ du jarojn poste ŝi eklernis la lingvon helpe de Sandor Horvath kaj John Gallagher en la grupoj kunvenantaj en iliaj hejmoj. La vera entuziasmo venis post la partopreno en la Melburna Somerkursaro en 2000. Ĝin sekvis plia lernado en la grupo de Max Wearing kaj per la helpo de Bob Felby. En 2003 Pat prenis, en Melburno, parton en plia somerkursaro kaj landa kongreso de la Novzelanda Esperanto-Asocio en Velingtono (Wellington). En 2005 ŝi mem kunorganizis somerkursaron – la Adelajdan. Jar-on poste ŝi jam helpis instrui malgrandan grupon da interesigantoj en Black Forest kaj vojaĝis al Eŭropo por ĝui la Vilnan UK-n kaj semajnon da Esperantumado en Germanujo. Estis granda travivaĵo! Ĉi-jare ŝi ĝuis semajnon de la somerkursaro en Merimbulah (Novsudkimrujo) kaj daŭrigas la kurson kun la grupo, gvidata de Trevor Steele. Ŝi restas fidela ankaŭ al la klubaj kunvenoj.

El kiuj materialoj ŝi lernis nian lingvon? El pluraj ilustritaj tekstoj kaj poste el *Step by step in Esperanto* de Montagu Butler. Ŝi aparte ĝuas legi Esperantan literaturon (ŝi posedas dudekon da Esperanto-libroj kaj multajn revuojn, kantojn ktp.).

Pat fieras pri sia belega familio: 4 infanoj (la filino Ruth mortis en 1994) kaj 5 genepoj. Ŝi ofte vojaĝas al Kanbero kaj Darvino (Darwin) por ĝui la kunestadon kun ili. Kun la filino Helen ŝi kunesperantumas en Adelajdo. Estas konate, ke ŝi ŝatas kanti (membras en ĥoro), skribi (skribadgrupo), legi, piediri, naĝi, vojaĝi (ŝi posedas ĉemaran ruldomon en Novsudkimrujo), teatraĵi (dum

kelkaj jaroj ŝi membris en la Opero-asocio en Kanbero kaj en Adelajdo ŝi ludis en la dramo “Virinoj de Trojo”) ... Pri siaj revoj kaj planoj ŝi diras: “Mi esperas vivi plene kaj aktive kiom eble plej longe kaj ĝui mian familion, amikojn, viziti belajn lokojn ... kaj havi multe da ĝojo dum la Esperantaj aranĝoj.”

[El *Tamen Plu*]



Vespero pri Esperanto antaŭ la komenco de nova Esperanto-kurso – de anonima kontribuinto –



Esperantoj.

La reklamoj estis metitaj en la gazetojn, la anoncoj senditaj helikpoŝte kaj retpoŝte al ĉiu el la 8 esperantistoj en la urbo – ĉi-vespere nova kurso pri Esperanto komenciĝos – sed ĉu iu komencanto venos?

La laca grupeto de maljunuloj rigardis la pordon, atendante, esperante. Ankoraŭfoje la 70-jaraĝa virino nombris la tasojn kaj reŝaltis la akvoboligilon. Ŝi rearanĝis la biskvitojn sur la telero.

“Lasu ilin. Mi ne scias kial vi metis tiom da biskvitoj sur la tablon. Ni jam scias ke neniu venos! Ĉiam okazas same... Ni reklamas, ni elspezas monon, ni luas ĉambron, preparas kursmaterialon, sed ĝi estas perdo de tempo, ĉar ni ĉiuj scias ke neniu venos!”

La virino ruĝiĝis kaj komencis, “Nu jes, en la pasinteco.... jes, sed eble ĉi-foje ... “. Ŝi ne kuraĝis pluparoli. En sia koro ŝi ankaŭ ne havis multe da espero, sed ili neniam allogus novajn esperantistojn sen reklamado, sen propono de kursoj.

Ili estis nur kvar, kvar personoj kiuj interesiĝis pri Esperanto antaŭ multaj jaroj. Ili estis plenaj de espero por la glora estonteco de la universala helplingvo, sed iom post iom ili ĉiuj maljuniĝis. Unu post alia la plej fervoraj komencis forpasi. De tempo al tempo kelkaj gejunuloj interesiĝis kaj la maljunuloj saltis sur ilin.

Ĉu vi volas legi tion ĉi, studi ĉi tiujn librojn, doni prelegon pri Esperanto, ĉeesti somerkursarojn, fariĝi sekretario eĉ prezidanto de nia klubo?? Kial ne? Ĉu vi ne volas pasigi ĉiun liberan momenton pensante pri Esperanto, disvast-

igante ĝin inter viaj amikoj? Viaj amikoj ne interesiĝas pri Esperanto? Do, la kulpo devas esti via – vi ne bone prezentis la lingvon. Konvinku ilin veni al nia prelego ... Kion? Ili ne volas veni ... Eĉ vi ne volas veni? Ni ne komprenas ... ni ne komprenas

Kaj la gejunuloj malaperis.

La kvaro rigardis la horloĝon. Estis jam 18:00 ... 18:10. Ĉu neniu venos? 18:15 – la pordo malrapide malfermiĝis. Juna viro eniris kaj ĉirkaŭrigardis.

“Ĉu mi estas en la ĝusta loko? Mi aŭdis ke oni povas lerni la hispanan lingvon ĉi tie.”

Ho ve, alia persono kiu pensas ke Esperanto estas tipo de hispana lingvo. Ne, bedaŭrinde ne sinjoro, ĉi tiu estas klaso pri Esperanto, la internacia lingvo.

“Internacia lingvo? Mi neniam aŭdis pri ĝi ... nu, mi kredas ke mi jam maltrafis la klason pri la hispana, diru al mi iom pri la internacia lingvo.”

La kvaro rigardis unu la aliajn. Tri tuj komencis paroli samtempe, tiam ĉiuj haltis. Kio estis la decidita akordo? Jes, la plej maljuna parolos kaj la aliaj silentos kaj iomete flankeniros por ne tro timigi la enketanton. Ili iris al alia tablo kaj mallaŭte balbutis en Esperanto por montri ke tio eblas, dum la konversacio pri Esperanto fluis kun la novveninta viro. La Esperantisto montris al li kursmaterialon kaj li ne forflugis!

Ridetante al si mem, la 70-jaraĝa virino refoje ŝaltis la boligilon kaj rearanĝis la biskvitojn. Ĉi-foje iu venis por manĝi ilin! □



Sydney Theatre Company Ludas en Esperanto de Rainer Kurz

Estis granda surprizo, kiam Emma Vuletic neanoncote eniris Esperantodomon en Redfern [Sidnejo] por peti nian helpon. Emma estis verkanta novan teatraĵon “Nether” por la Sydney Theatre Company. Tiu eksperimenta teatraĵo temas pri komunikado kaj nekomunikado pere de diversaj rimedoj, “kiam mankas la al kutimeco, komforto kaj sekuro de komuna lingvo”. Ĝia scenejo estas mistika senaera planedo. La kvin aktoroj malsukcese penas interkomunikadi per la angla, per signolingvo, subtitoloj, gestoj, kaj Espe-

ranto.

Hazarde irante laŭ Strato Lawson Emma vidis la afiŝojn ĉe Esperantodomo kaj eniris por diskuti la projekton kun Margaret Chaldecott. Oni decidis enmeti Esperanton. Poste mi renkontis la teatron teamon por respondi demandojn kaj por instrui la ĝustan prononcon.

La 17an de februaro okazis la unua provprezento de “Nether”.

La teatra teamo nun petas subvenciojn por tiu verko, por plibeligi kaj plilongigi ĝin. Ni deziras al ili sukceson. □

[Laŭ *Telopeco*]. □

RIMI AŬ NE RIMI

Verkita de Jack Drake

Tradukita de Gaye Phillips

Nuntempe anoj de la intelekta koteri'
 Rikanas al la utilec' de rim' en poezi'.
 Sed kial? Ĉiam rimo estis ja la ĉefa part',
 Kaj sen ĝi baldaŭ velkos for la poezio-art'.

De post la origin' de poezi' distriĝis ni
 Per rim' kaj ritmo kune en perfekta harmoni'.
 Nu, Tenison kaj Bajron estis majstroj de distik',
 Kaj havas verkoj de "La Bard'" la fluon de muzik'.

Sed tiun stilon multaj homoj mokas kun fervor',
 Kaj diras ke nerimaj vortoj estas nun la mor'.
 Poemamantoj krias ke la ŝanĝoj estas krim',
 Ĉar ĉiam la patrico de poeto estis rim'.

Ne plaĉas al mi strofo kie unuvortlini'
 Sekvata estas de lini' kun vortoj dudektri;
 Kaj oni stumblas tra ĝi en senflua manier'.
 Ho, kiel iu ĝin aplaŭdas estas ja mister'!

Do, ĉu la klera menso vidas ion de kvalit'
 En tia stilo kiun mi rigardas sen merit'?
 Ne, ne! La solvon fine trovis mi pri la afer' —
 Kulturaj homoj tro stultiĝas rimi — jen la ver'!

Noto de la redaktoro: Se ankaŭ vi preferas poeziumi uzante rimojn, vi eble trovos utilaj kelkajn rimvortarojn en Esperanto, kiujn poeziemuloj povas konsulti. Du el ili troveblas per Interreto: Rata Vortaro ĉe:

<<http://esperanto-jeunes.org/ravo/ravo.html>>

kaj

<http://www.geocities.com/sten_jo/eo/rim/piv2rim.html> (disponigas ĉiujn terminojn kaj nomojn en PIV, laŭ siaj lastaj (rim-)silaboj.

*Ankaŭ eblas aĉeti ĉe UEA la libron *Esperanta Rimvortaro* de Jonathan Cooley, ĝia prezo estas €6.30 plus sendkostoj.*

INFORMO DE VINILKOSMO

La distribuado tuja de la nova albumo de jOmO, *jOmO Slavumas*, estas tute certe la granda evento de ĉi-printempa komenciĝo. Tiu verko, jam disponebla ĉe Vinilkosmo.com, estas gratifikita per videoprezento spektinda ekde nun enrete.

La reveno de Kore, kiu surprizis ĉiujn post malapero kiu ŝajnis anonci la finon de la neforgesebla bando de Kris Spitzer, preparas ne nur duan albumon, sed ankaŭ rekoncertos en Esperantio en la kongreso de UFE en Rennes en majo kaj en *Festo*; vi povos legi pli detale ĉi-sekve.

Du novaj volumoj prezentante la rusan bardon, Mihail Povorin, venos por pliampleksigi tre baldaŭ la rusan kolekton *Oraj kantoj*, kaj ankaŭ du kompilaĵoj, unu dediĉita al hiphopo kaj alia al metala muziko, estas en la bako de Vinilkosmo.

Kaj legante asidue, vi malkovros la antaŭeniron de la albumo de Supernova, novaĵojn el Afriko, de la insuloj, de Eurokka, ktp., ktp.!

Nia kompleta katalogo ĉe :

<http://www.vinilkosmo.com>

Novaĵoj

VKKD 82 *jOmO Slavumas*

JoMo: Prenu belan pokalon kaj verŝu du fingrojn da cigana muziko, unu da jida, unu viglan gluton da roko, kaj dronigu la tuton en abunda bano de ritmoj kaj sonoj el slavaj landoj, sed precipe lasu *jOmOn* aldoni Esperanton kaj servi al vi tiun mirigan koktelon kiu transportos vin en mondon tiom familieran kiom konfuzan ekde la unua gluto!

Tiu ĉi nova KD, konsumenda sen modero, estas fakte kvazaŭ duobla albumo de pli ol unu horo, kiu kunigas *jOmOn*, liajn fidelajn kompanojn Liberecanoj, kaj la ensemblon de

tradicia slava muziko *Solniška*.

La rezulto estas unika sperto kiu preskaŭ pensigus al ni ke roko venis de Rusio aŭ Ukrainio, kaj sen vere aŭdaci tion diri, rakontas tamen ĝian historion, neniigante samtempe kelkajn malnovajn limojn kiuj rezistas nur pro kutimo.

Por vidi kaj aŭskulti la videofilmeton registritan en nia studio *Vinilkosmo/La Trappe*, aliĝu Eurokka-n.

Vinilkosmo-Projektoj

Hiphopa kompilo

Vinilkosmo eklanĉis novan projekton de kompilaĵo kies celo estas prezenti hiphopon (repon) en esperanto.

Nova defio! (La lasta estis la *Elektronika kompilo* VKKD 53.)

Ĝis nun neniu havis vere la aŭdaccon lanĉigi en plena albumo hiphopa, kaj de tiu konstato venis la ideo starigi kompilaĵon el diversaj stiloj de hiphopo el diversaj landoj...

Ĝis nun reagis kaj respondis al la alvoko la francoj Pafklik, JoMo, Kore, la germana DĴ Kunar, la danoj Bjorn Bojezen kaj Kim Henriksen kun sia nova bando Hotel Desperado, la finnoj de Dolchamar, la brazilanoj DĴ Roĝer, Flavio Fonseca kaj Antonio Moreira, la pola Eterne Rima, la slovaka Marteno Minihk, la ukrainlitova Piĉismo, la ĉilia La Zinfonia, la argentina Strika Tango, kaj la rusa Sergej Tikhonov.

Metala kompilo

Paralele al la *Hiphopa kompilo*

jam lanĉita, jen alia kompilprojekto kiu celos prezenti metalmuzikon en Esperanto.

Malmultaj bandoj ekzistas por tiu stilo en Esperanto, sed la movado disvolviĝas! Diversaj stiloj de metalo apudestos sur tiu kompilaĵo (pezmetalo, mortmetalo, traŝmetalo, gotika metalo, hardkora metalo, melodia metalo, simfonia metalo, ktp.).

Jam kelkaj bandoj estas interesitaj en Brazilo, Slovakio, Ukraino, Pollando, Argentino, kaj Francio.

Tre verŝajne la kompilaĵo estos eldonita en Brazilo kunprodukte de Vinilkosmo kaj la tutnova brazila eldonejo Kosmuziko:

Interesitoj povas sin turni al Vinilkosmo:

vinilkosmo@esperanto.org

Ĉu membriĝi al EUROKKA ?

Se vi ankoraŭ ne estas membro, tiam vi povas ĉi tie aliĝi:

<http://artista.ikso.net/eurokka/membro/login.php>

Kial aliĝi al Eurokka?

Ĉar tiel vi montros vian subtenon al la muzika agado de Eurokka kaj krome, per Eurokka vi estos informita pri la plej freŝaj muzikaj novaĵoj. Aliĝintoj de Eurokka tiel havos: la informleteron de Vinilkosmo, la retan version de *Rok-gazet'* kiam ĝi funkcios, video-novaĵojn (kiel ekzemple tiun videon de JoMo), eventualajn surprizajn rabatojn ofertitajn de Vinilkosmo pere de Eurokka.

Kore II, la Reveno ...

La fanoj de Kore (VKKD 26) estos ravitaj eksciante ke la bando preparas sian duan albumon post preskaŭ kvinjara silentado!

Kore ankaŭ reaperos sursceneje

kaj malkovros siajn novajn muzikaĵojn, sed ankaŭ kelkajn el sia unua albumo okaze de la kongreso de UFE en Rennes en majo 2006.

Ni retrovos ankaŭ la bandon la 26an de aŭgusto en la festivaletto *Festo* en la kastelo Grezijono en Baugé (Maine et Loire/ Francio).

Supernova

La album-projekto pop-roka de la bando brazila Supernova antaŭeniras paŝon post paŝo. La registrado estas en la lasta fazo, kaj intertempe la bando finis la surbendigon de videofilmeto de unu muzikaĵo kiu aperos sur la KD.

La KD estos disponebla en la Vinilkosmo-katalogo ekde sia apero.

Aspiro

La triopon Aspiro fondis iamaj ukrainanoj kaj rusiano: Sergej Orlovskij, gitaristo; Olga Litvinova, juna kantistino; kaj Grigory Grin, gitaristo kaj organizanto.

La nunaj planoj de Aspiro, krom partopreno en venontaj esperantistaj aranĝoj, inkluzivas registri KDo(j)n por la projekto *Kantoj de diversaj popoloj de la mondo en la internacia lingvo Esperanto*.

Sekva ebleco renkonti Aspiranojn estis la 1-a de aprilo 2006 en Neu-Ulm (Germanio) dum la komuna kunveno de Esperanto-ligoj de Bavario kaj Baden-Virtembergo, kaj poste dum PSI (Printempa Semajno Internacia).

Pliaj informoj haveblas en la retejo de Aspiro:

<http://aspiro.vorota.de>

FESTO

Kafe ne okazos en 2006, sed *Festo*, la

renkontiĝo de JEFO (Junulara Esperanta Franca Organizo), okazos en la esperanta kultura kastelo Grezijono en Baugé de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto 2006.

Ĉifoje la teamo de *Festo* kunlaboras kun EUROKKA por organizi muzikkulturan programon invitante kvalitajn artistojn kiuj preskaŭ neniam prezentigis en Francio: la granda reveno de Kore, koncerto hip-hop/ropa Gangstel', Pafklik, FaMo kun sia akordiono franceca, la juna pola voĉo Suzana Kornicka, la juna rusa barda Helena Melnikova, la ĵazbando Melono, Esperanta Ĥoro: kaj multaj aliaj artaj kaj kulturaj aktivaj, interalie teatro, kino, diskoteko, prelegoj, ludoj, ekskursoj, ktp. http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=152

Ĝeneralajn informojn petu de: <cyrille@esperantojeunes.org>

Kanzonoj el Moskvo

Mihail Povorin, fama rusa esperanta bardo, finfine surbendigis siajn kantojn en studio por la feliĉo de liaj fanoj kaj ŝatantoj de tia muzikĝenro.

Mihail kreas kantojn en Esperanto depost 1989, ofte koncertas en Rusio, kaj lastatempe ankaŭ internacive (nivele). Sed ĝis nun preskaŭ nenium kanton li registris en studiaj kondiĉoj.

En lia repertuaro estas ĉirkaŭ 60 kantoj, plejparte originalaj, sed ankaŭ tradukitaj de li: unuavice lirikaj, ankaŭ satiraj, movadaj, popaj, eĉ erotikaj.

Mihail apartenas al la moskva skolo de esperantaj poetoj. Do, enhavriĉaj tekstoj tre gravas por liaj kantoj, same kiel belaj melodioj. "Mia kara amik'" kaj "Fajrereto" es-

tis registritaj antaŭe en albumoj de Jomart kaj Nataŝa. "Valso de vojaĝantoj" estas komponita laŭ versaĵo aperinta en la libro de B. Kolker *Vojaĝo al Esperanto-lando*. Por kelkaj kantoj la bardo uzis poemojn de R. Schwartz, J. Baghy, G. Deŝkin.

Mihail partoprenis la registradon de *Oraj kantoj* (VKKD 56, 57, 58, 59, 60), kaj la organizanto denove estas la moskva esperantisto G. Kokolija. Estas eldonotaj du diskoj, kun po 20 kantoj. La kantoj sonos senartifike, kvazaŭ dum koncerto. La unua disko aperos printempo-fine. Iom poste sekvos la dua.

Vintra turneo de Mikaelo Bronŝtejn
Mikaelo Bronŝtejn, verkisto, tradukisto, poeto, bardo el Rusio, turneis ĉi-vintre en Germanio (plus Antverpeno, Belgio).

KDoj kun la kantoj de Bronŝtejn kaj la tekstoj de Bronŝtejn abundas ĉe Vinilkosmo.

Novaĵoj el Afriko kaj Insuloj

La muzikisto Denis Tamba, alinome Rock Tamba, prepariĝas por antaŭenpuŝi Esperanto-muzikon en la stratoj de la konga ĉefurbo. Dank' al la helpo de la bando *Masikulu Abha Africa* gvidata de André Mbongo za Mambu, li konceptas novan artan realigon titolitan "Libera".

En la venontaj semajnoj tiu kantisto enstudiĝos por realigi tiun tiom atendatan ĉefverkon.

Por informo: *Masikulu Abha Africa* estas muzika grupo kiu praktikas muzikon de stilo t.n. "esplorado". Per belaj voĉoj de junaj kantistoj subtenataj de talentaj instrumentistoj, ĉio donas la indikon ke "Libera" estos altkvalita. □

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la julio-aŭgusta numero: 15a de junio 2006

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio
esk@esperanto.org.au



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Igor Couto | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: Miranda Lutz | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: Stephen Pitney | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$10.

Pagu al Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

P. O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Nov-Zelando

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@xtra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano.

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €24,00. Pagu ĉe UEA al la konto ael-w de la Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub **LA SUDA KRUCO**

Vol. 14, n° 3, Marto-Aprilo 2006

If undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

**POSTAGE
PAID
AUSTRALIA**